**PILO-PRESS**

Internacia Informservo

Subtenu la informadon!

Abonu PILO-PRESS

Jarabono 30 GM

Eldonanto/Herausgeber:
Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg
Tel. (0911) 46 36 49; 51 42 69



N-ro 21/1975 5 junio 1975

Aperas ĉiusemajne

## Denove pri la 27a IFEF-kongreso

### Citaĵoj el la Kongresa bulteno

**Villach.** (pp) Kiel ni jam informis, de la 9 ĝis 16 majo 1975 okazis en la aŭstria urbo Villach la 27a Kongreso de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio. Pri la kongreso ni raportas per citaĵoj el la Kongresa Bulteno:

**Vendredo, 9a de majo**

La unua programero de la kongreso estis la gazetara konferenco, kiun partoprenis krom la IFEF-estraro kaj LKK reprezentantoj de jenaj gazetoj: Kleine Zeitung, Kärntner Tageszeitung, Volkswille, Volkszeitung kaj RADIO ORF. Ĉiuj multe demandis kaj tre interesiĝis, kaj la reprezentanto de Volkszeitung tuj promesis aperigi esperantlingvajn novaĵojn dum la kongresa semajno. Menciinda estas ankaŭ radio-elsendo kun intervjuo kun la vicprezidanto de LKK, s-ro Pawlik.

**Dimanĉe, la 11a de majo**

400 gekongresanoj partoprenis la sanktan meson en la Nikolaj-preĝejo. La meson celebris pastro Albino Ciccanti el Rimini.

Dum la solena malfermo post la bonvenigaj vortoj de LKK-prezidanto inĝ. W. Huber parolis nome de UEA s-ro Peter Zlatnar, nome de FISAIC, s-ro G. Gilles. Nome de la aŭstraj fervojoj parolis dipl.-inĝ. Franz Bachler, kaj nome de la urbo Villach la urbestro, s-ro inĝ. Josef Resch bonvenigis la gekongresanojn. Viclandestro (iama trafikministro) s-ro Erwin Frühbauer finis la vicon de paroladoj flanke de la honoraj gastoj per tre afablaj bondezirojn por sukceso de la kongreso.

La fervojista orkestro de Arnoldstein ludis kaj poste sekvis la salutoj de reprezentantoj de 20 landoj.

La IFEF-prezidanto Joachim Giessner malfermis la kongreson per parolado, dum kiu li dankis al LKK pro la bona elekto de kongresloko kaj al la honoraj gastoj pro la afablaj vortoj. Li menciis ankaŭ la salutvortojn en la kongreslibro. La prezidanto substrekis la fakan parton de niaj kongresoj kaj la bonajn rilatojn al FISAIC!

**Ĵaŭde, la 15a de majo** la plenkunsido. La prezidanto malfermis la kunsidon kaj la sekretariino laŭtlegis salutleterojn, i.a. de ŝtatestro de Aŭstrio, d-ro Kirchschläger, federacia kanceliero d-ro Kreisky, 1a prezidanto de aŭstria parlamento, Benya, 3a prezidanto de aŭstria parlamento Probst, trafikministro Lanc kaj multaj aliaj eminentuloj de politikaj, fervojaj kaj sindikataj instancoj. Menciinda estas la letero de la oficejo de d-ro Waldheim, ĝenerala sekretario de UN.

Posttagmeze..en la stadiono ludis kongresanoj el 7 landoj piedpilkon kontraŭ la anoj de la fervojista banko SPARDA, kiu gajnis la pokalon de Sparda Linz. La rezulto: 3 : 6. La teamoj interŝanĝis memoraĵojn. Vespere dum la junulara aranĝo estis elektita "Miss Esperanto, f-ino Landgraf, kiu ricevis krom rubando kun enskribo Miss Esperanto belan pokalon.

Pri la internacia konferenco en Saarbrücken

La Sarlanda Esperanto-Ligo informas, ke la celo de tiu konferenco estas duobla: "unuflanke ĝi studos la situacion de la monda lingvo-problemo kun speciala atento pri la solvo per esperanto; aliflanke ĝi studos la apartajn problemojn de la Esperanto-movado ekestintajn por la Hamburga Universala Kongreso per la forlaso de la principoj de neŭtraleco kaj demokrateco fare de la nuna UEA."

Komento de Pilo-Press: La aserto, ke la nuna UEA forlasis la principojn de neutraleco kaj demokrateco, estas laŭ nia opinio subjektiva opinio kaj ne pruvita. Por Pilo-Press la nuna UEA kun la estraro kaj komitato elektita en Hamburgo reprezentas la neŭtralen Esperanto-movadon.

Por-Esperanta laboro inter Socialistoj

Schoorl, NL (pp) La Federacio de Laboristaj Esperantistoj en kunlaboro kun la Eŭropa Esperanto Centro vaste propagandis Esperanton en la Partio de Laboro kiu havis kongreson komence de Aprilo.

Ĉiuj sekcioj ricevis leteron pri la propono de la Itala Socialdemokrata Partio uzi Esperanton en la socialista internacio. En tiu letero oni demandis subtenon al la propono de Sekcio Gouderak rilate al la sama afero kaj estis substrekita la valoro de Esperanto-instruado por atingi pli bonajn rilatojn inter la membroj de socialistaj partioj ĉie en la mondo.

Kvankam ni ne sukcesis ke oni oficiale pritraktu la proponojn tamen dum malgranda ekspozicio, kiun prizorgis Hans Bakker (patro) multaj kongresanoj demandis detalojn pri Esperanto. Krome aperis kelkaj artikoloj en la partia gazeto kaj oni sendis plurajn leterojn al la partia estraro, la internacia sekretario kaj al la nova prezidanto.

Interskola 1975

Sub tiu titolo okazis jam renkontiĝo en Norvegujo, Skotlando, Svedujo, Finnlando kaj Irlando. La celo estas pritrakti la problemojn pri edukado en elementaj kaj daŭrigaj lernejoj en maldense popolataj regionoj de Eŭropo. Ĉi-jare oni ankaŭ diskutos pri dulingveco. La instruistoj renkontiĝos en "Wales" de 8 - 16 julio 1975. Oni nenion menciis pri konferenca lingvo.

Informojn donas D-ro J. Davies, Pricipal Normal College, Bangor, Wales. Instruistoj-esperantistoj kiuj interesiĝas kaj volas propagandi Esperanton bonvolu skribi al adreso!

Novajoj el Paderborn

Paderborn (pp) Hermann Behrmann informas, ke oni kontaktis nun ĉiujn elementajn lernejojn de Paderborn pri Esperanto-instruado en la venonata lerneja jaro. Oni klopodas ekhavi sufiĉe multe da klasoj en kiuj Esperanto estos instruata.

Prof. d-ro Frank, instituta direktoro de FEoLL, ministeria konsilisto Kurt Seelmann, laŭjura direktoro de FEoLL, kaj Hermann Behrmann, scienca kunlaboranto, restadis en Parizo kaj en Le Mans por aktualaj interparoloj pri esplorcentroj. Hermann Behrmann krome estis ankaŭ en Prago, kie li partoprenis fakan konferencon.

************

Interesaj Esperanto-Revuoj

| JUNA AMIKO | - | HOMO kaj KOSMO | - | Europa Dokumentaro |
|---|---|---|---|---|
| 3,-- GM | | 6,-- GM | | 12,- GM |

Abonu ĉe Libroservo Ludwig Pickel, 85 Nürnberg 1, Postfach 2113

## Esperanto en la radio

**Elsendoj aŭdeblaj en Meza Eŭropo laŭ mezeŭropa tempo**

**Ĉiutage**
**Varsovio**
6.00— 6.30 horo 31 m, 49 m, 200 m
16.30—16.55 horo 31 m, 41 m
22.30—23.00 horo 49 m, 200 m
Informoj, komentarioj, felietonoj, Esperanto-Ekspreso, Koncertoj kun bondeziroj k. a.
Programfolio senpage ĉe Pola Radio, Esperanto-Redakcio, P. O. Box 46, PL-00-950 Warszawa 1, Pollando.
**Dimanĉe**
**Vieno**
6.45—6.55 horo 48,74 m, 41,38 m
Komentarioj, radiaj artikoloj, leterkesto.
**Adreso:** Esperanto-Redakcio, ORF, P. O. Box 700, A-1041 Wien, Austrio.
**Sofio**
9.30—10.00 horo 31 m
21.05—21.30 horo 49 m
Sciigoj el Bulgario, popola muziko.
**Adreso:** Radio Sofia, Esperanto-Fako, Sofia, Bulgario.
**Romo**
21.00—21.20 horo 25,42 m, 30,90 m, 41,24 m
Novajoj el Italio, Esperanto-Kuriero, Leterkesto.
**Adreso:** Radio Roma, Esperanto, C. P. 320, I-00182 Roma, Italio.
**Lunde**
**Berno**
13.20—13.30 horo 31,46 m, 46,66 m, 75,28 m
Felietonoj pri svisaj kaj Esperantaj temoj.
**Adreso:** Schweizerischer Kurzwellendienst, Esperanto, CH-3000 Bern 16.
Programfolio senpage!
**Merkrede**
**Berno**
13.20—13.30 horo 31,46 m, 48,66 m, 75,28 m
Felietonoj pri Esperantaj temoj.
**Ĵaŭde**
**Berno**
22.45—22.55 horo 31,46 m, 48,66 m, 75,28 m
Ripeto de la lunda elsendo.
**Vendrede**
**Zagrebo**
00.05—00.20 horo 264 m
Novajoj el Jugoslavio, radiaj artikoloj.
**Adreso:** Radio Zagreb, Esperanto-Fako, YU-41000 Zagreb.
**Pekino**
21.00—21.30 horo 43 m, 33 m, 31 m
Informoj, raportoj el la ĉina kulturo, politiko, ekonomio.
**Adreso:** Radio Pekino, Esperanto-Redakcio, Pekino, Ĉinio.
**Sabate**
**Vieno**
17.45—17.55 horo 48,74 m
Komparu la dimanĉan elsendon!
**Pekino**
21.00—21.30 horo 43 m, 33 m, 31 m
Vidu la vendredan elsendon!
**Berno**
22.45—22.55 horo 31,46 m, 48,66 m, 75,28 m
Ripeto de la merkreda elsendo!

## Invito al Somernokta Festo

Ĝi

La 21 kaj 22 junio 1975 okazos en Rasthaus "An den Fichten" (Pfälzerwald-Hütte)

D-6731 St. Martin/Weinstr., An der Totenkopfstr. (meze en la palatina arbaro, apud lageto).

Oni loĝas komune en granda tendo.

El la programo: nokta migrado, ĉefajra viandmanĝaĵo - kampfajro, gemuta kunestado, somernokta sonĝo ktp.

Kostoj por membroj de GEJ kaj eksterlandanoj 12,- GM, por aliaj 15 GM.

Aliĝu ĉe Hans-Dieter Platz, D-6731 St. Martin, Maikammerer Str. 21, Telefono 0623/5982

****************

## Bulgara - Aŭstria Kulturaranĝo

Sabate, la 7an de junio 1975 okazos en la Bulgara Kulturdomo de Vieno, Wien 4, Schwarzenbergplatz 10/2

Bulgara - Aŭstria Kulturaranĝo.

Komenciĝo 16a horo.

Salutos: D-ro Nikola Nedeff, ĝenerala sekretario de la Aŭstria-Bulgara Societo, Senata Konsilisto D-ro Leopold Grimme, Honora Prezidanto de Aŭstria Esperanto-Federacio, kaj Peter Germanov, Direktoro de la Bulgara Kulturdomo.

***************

## Internacia Ekonomia Seminario

Esperanto-Rondo ĉe la Ĉefa Altlernejo pri Planado kaj Statistiko serĉas kontaktojn kun esperantistoj-ekonomiistoj.

Tiu ĉi Esperanto-Rondo intencas organizi Internacian Ekonomian Seminarion printempe 1976.

Programo de la Seminario eliros post kelkaj monatoj.

Aliĝu ĝis la 1a de decembro 1975 ĉe jena adreso:

Koło Esperantystów SGPiS
Al. Niepodległości 162
PL-02-524 Warszawa, Pollando.

***************

## Esperanto-elsendo en Vieno sur Mezondo

Ĝi okazas ĉiun kvaran mardon sur ondo 203,4 m.
La venontaj elsendoj oakzos:
24.6.; 22.7.; 19.8.1975

====================

Aŭskultu kaj skribu al la Esperanto - Radio- Stacioj. Vidu la adresojn apude!

Esperanto en la radio

Varsovio. En sia plej nova leterkesto la Esperanto-redakcio de Pola Radio anoncis rekordan nombron da korespondaĵoj en ĉi tiu jaro. Ĝis la 31.5.75 la Esperanto-redakcio ricevis pli ol 2.180 korespondaĵojn. Tio certe estas impona nombro!

Sur la pinto de plej diligentaj korespondantoj solece staras la finna aŭskultanto Olaavi Kalevaala kun ĉ. 190 korespondaĵoj. Tiu nombro signifas, ke li skribis ĉiutage pli ol 1 leteron. Komparante kun la germana poŝta tarifo, li elspezis ĉ. 130 GM por afranko. 27 pliaj aŭskultantoj sendis dum la unuaj kvin monatoj de ĉi tiu jaro inter 40 - 10 leteroj.

Regula aŭskultanto de preskaŭ ĉiuj aŭdebla Esperanto-stacioj estas d-ro Josef Kondor, 545 Neuwied. Pri siaj spertoj li komentas:

"Miaj lastatempaj spertoj rilate Esperanto-disaŭdigojn: Varsovion mi povas matene ne plu sur meza ondo kapti (aŭ nur tute malforte!), nur sur la 49 m ondolongo, sed tie tute klare, laŭte., sen ĝeno! Posttagmeze nur malfacile sur 41 m, kelkfoje ankaŭ sur 31 m. Vespere estas la aŭdebleco sur meza ondo ne plu tiel forta, klara, kiel pli frue.
Radio Wien: hieraŭ, sabate, la 31.5. mi ĉagreniĝis, ĉar la E-programo komenciĝis kun granda malfruo, sed finiĝis abrupte, dum la parolo pri IEMW, sen leterkesto. Jam la duan fojon, ke mankas leterkesto. Mi ne scias, ĉu vere la leteroj mankas aŭ la tempo por anonci ilin?!

Radio Roma: Lastajn du dimanĉojn mi preskaŭ tute bone povis kapti Romon, sur la 41 m ondolongo. Ankaŭ la perletera kontakto estas bona inter ni, pli bona ol pli frue.

Radio Bern: Jam delonge mi ne havis la eblecon dumtage kapti ĝin, sed antaŭ semajnoj mi sukcesis ĉiam tute klare, pure, laŭte kapti ĝin

Radio Pekino: Jam plurajn sabatojn mi sukcese aŭskultas Pekinon kaj kontentige bone. Pro mia korespondaĵo Radio Pekino donacis lastan fojon belajn kajerojn al mi (Heroaj fratinetoj sur la stepo kaj Kokeriko en noktmezo) kaj belegajn pm-seriojn. Pli frue ili sendis al mi elegantan notlibron en leda kovrilo! Marĝene mi mencias, ke ankaŭ Radio Roma donacis al mi belegan libron pri Italio, en germana lingvo "Das ist Italien". Do la ekzemplon de Varsovio sekvas ankaŭ aliaj stacioj! Wien donacis al mi jam komence la belan sondiskon de viena aktoro Z. (rakotnoj, poemoj en Esperanto)."

El la semajna komentario de D-ro Alfred Macher, Radio Vieno:

"En Salzburg la prezidento de Usono kaj la prezidento de Egiptio komune penadas pri finfina solvo de la jam multe tro longdaŭra Proksimorienta Krizo. Aŭstrio gastigas ilin, disponigas la ejojn por restado kaj konferenco, pagas festenon. Sed Aŭstrio certe ludas ankaŭ malpli eksteraĵan, interne signifan rolon.

Laŭ la spirito de aktiva neŭtraleco, niaj diplomatoj kaj politikistoj dum la lastpasintaj jaroj senlace kunhelpis forigi internaciajn malharmoniojn, repacigi konfliktojn. Speciale en la Proksimorienta problemo kanceliero Kreisky persone interesiĝis. Du fojojn li vojaĝis tra Izraelo kaj la arabaj ŝtatoj, establante kontaktojn en ĉiu direkto. Inter ni kaj Egiptio evoluis rilato de reciproka fido, tiugrade, ke prezidento Sadat sugestis, ke Kreisky partoprenu en la ĝeneva konferenco pri la Proksima Oriento."